Post la tagmanĝo kelkaj el ni devis foriri pro la trajnhoraro. Ankoraŭ kortuŝitaj pro la varietea vespero ili adiaŭis kasante sian emocijon kaj kunportante neforgeseblan memoraĵon.

Je la 16a okazis granda evento: la alveno de la karavanaj biciklantoj de Sr^o Jorgos, kiuj estis akceptitaj de la geesperantistoj kaj de aliaj personoj. Foririnta el Sud-Francujo ili direktiĝas bicikle tra Eŭropo ĝis Varsovio por la Universala Kongreso, propagante esperanton en ĉiu urbo, kie ili haltas. Ni gratulas ĉiujn elkore!

Sed oni ne devas forgesi la organizantojn de ĉi-tiu kongreso kaj de tiu memorinda vespero, inter ili nian ŝatatan S-r^on DENIS, kiu tiom laboris, por ke tiu kongreso sukcesu, kiu nelaceble tradukis majstre tion, kio estis dirita esperante por la ne-esperantistoj kaj inverse. Ĉiu partoprenanto de la Federacia Kongreso prezentas al li plej korajn dankojn kaj gratulojn.

Odette SCHEIDEL
(67 - BETSCHDORF)

GRAVA ATENTIGO!

En nia venonta numero (...59 - fine de septembro) vi malkovros aliĝilon por nia aŭtuna staĝo de PAROLATA ESPERANTO en MONTIGNY-lès-METZ. Ni rememorigas, ke tiu staĝo estos kupligita kun tre grava filatela evento! (Vidu aliloke!). Plie ni ĝuos elstarajn prelegojn de A. CHERPILLOD ...:"Ĝis kiu grado Esperanto estas aglutina lingvo?"... kaj "Kiu estis Ĵana d'Arko kaj kiel ŝi mortis?"...

Trafa konsilo: TUJ POST la ricevo de la septembra n^o (59) sendu nepre vian aliĝilon por la staĝo, kiu okazos la 7/8ajn de novembro!

Vi EGE simpliigos la laboron de nia sindona amikino Marthe NAU!

FINANCA RAPORTO - ORIENTFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO - 1986 (DATO: 2/2/1987)

ENSPEZOJ FEDERACIO:

81 Federaciaj membroj	1620,00
59 UFE-membroj kun pago	922,00
3 Donacoj al Federacio	415,00
17 donacoj pro geedziĝo	5520,00
6 Vendo de materialo	199,90
2 Rentumo resp.-kupono	538,16
1 Profito UFE-Kongreso	11358,41
4 Perado de kotizoj	755,00
1 Repago libro-servo	658,00

 21716,47

ENSPEZOJ "INFORMILO"

204 Abonantoj	7261,84
2 Donacoj al "INF°"	1020,00

 8241,84

ENSPEZOJ FEDERACIO: 21716,47

ELSPEZOJ FEDERACIO: 7074,35

 PROFITO FEDERACIO: 14642,12

Havo je la 31/12/85	6165,61
PROFITO FEDERACIO	14642,12
PROFITO "INFORMILO"	-460,56

Havo je la 31 12 86 20347,17

Havo de la Federacio	20347,17
Havo de la Libro-S°	84242,40

SUME 104589,57

ELSPEZOJ FEDERACIO:

11 Sekretariaĵoj	670,15
9 Propagandoj	2998,20
3 Repago de malprofito	2512,00
1 Aĉeto de materialo	139,00
4 Perado de kotizoj	755,00

7074,35

ELSPEZOJ "INFORMILO"

1 Eldonado "Inf° 53"	2106,54	
1 Eldonado	54	1826,15
1 Eldonado	55	1632,69
1 Eldonado	56	2076,94
4 Enlandaj sendkostoj	259,08	
2 Eksterland. sendkostoj	220,00	
6 Materialo por "Inf°"	621,00	

8742,40

ENSPEZOJ "INFORMILO": 8281,84

ELSPEZOJ : 8742,40

 PROFITO "INFORMILO" -460,56

 La kasisto
 A. GROSSMANN

La financa situacio de nia federacio ege pliboniĝis, parte pro la Nacia Kongreso sed ankaŭ pro diversaj donacoj. Ĉu tio helpos al ni plimultigi nian membraron kaj la abonantaron al LA INFORMILO en 1987?

NIAJ DONACINTOJ EN 1986

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotiz-jaro 1986:

Donaco al la Federacio:

Sr° Bertrand DENIS 65,00F - S-in° ORY 165,00F

Sr° REITTER 185,00F

Donaco por "LA INFORMILO":

Sr° BERGEROT 1000,00F Sr° ZELAZNY 20,00F

FINANCA RAPORTO PRI LA LIBRO-SERVO: 1986

ENSPEZOJ

Poŝt-ĉek-konto je la 1/1/86	2224,68
Vendo de libroj	17094,60
Vendo de diskoj kaj kasedoj	1830,00
Vendo de diversajĵoj	1216,00
Repago de afranko	514,80
Repago de kovertoj	36,00
Diversaj enspezoj (donacoj tro-pagoj)	240,35
	<hr/>
	23156,43

HAVO DE LA LIBRO-SERVO (31/12/86)

Libroj	73480,00
Diskoj, kasedoj	2483,00
Poŝtkartoj	2032,00
Esperantaĵoj diversaj	1010,00
Poŝtmarkoj	270,70
Ŝuldoj al la L ^o -S ^o	739,60
Poŝt-ĉek-konto	4227,10
	<hr/>
	84242,40
Ŝuldo al la Federacio	-1242,00
	<hr/>
	= 83000,40

ELSPEZOJ

Aĉeto de libroj	14538,32
Aĉeto de diskoj, kasedoj	1133,68
Aĉeto de esperantaĵoj	315,20
Mandat-, dogan-, ŝanĝ-, kontrol-kostoj	580,10
Aĉeto de poŝtmarkoj	922,40
Diversaj aĉetoj	108,43
Malpliigo de ŝuldo al la F ^o	658,00
Ne-pagitaĵoj de klientoj	73,20
Ŝuldoj de klientoj	600,00
Poŝt-ĉek-konto (31/12/86)	4227,10
	<hr/>
	23156,43

REZULTO DE LA JARO

Havo je la 1/1/86	77882,98
Profito	+ 5117,42
	<hr/>
Havo je la 31/12/86	= 83000,40

PERKORESPONDA KURSO

El 66 komunikoj senditaj al la gazetaro regiona almenaŭ 35 aperis. Jen do kiel la regionaj gazetoj enpresas niajn informojn:

"Le Républicain Lorrain" (Metz) enpresis 7 komunikojn, "Les Affiches-Moniteur" (Strasbourg) kaj "L'Union" (Reims) aperigis po 5. "L'Est Rép." (Nancy), "Les affiches de la Haute-Saône (Lure) kaj "L'Alsace" (Mulhouse) aperigis po 4 (sed "L'Alsace" ĝenerale enpresas tiel resume, ke la efiko estas nula). "Les Dernières Nouvelles d'Alsace" (Strasbourg) aperigis 3 (ankaŭ resumitaj). "La Haute-Marne Libérée" (Chaumont) 2, "La Liberté de l'Est" (Épinal) 1. Nur 1 gazeto ("L'Echo des Vosges" en Gérardmer) nenion enpresis ĉi-jare. Do, tiel ni konas niajn amikojn...

Venis ĝis nun 90 informpetojn. Mi indikas, laŭ la departementoj, 2 ciferojn: la 1a montras la nombron de informpetoj, la 2a la nombron de aliĝintoj: 57 (24-7) - 54 (12-4) - 68 (11-5) - 51 (11-5) - 88 (9-4) 52 (5-3) - 67 (4-3) - 70 (3-2) - 55 (0) - cetera Francio kaj eksterlando (10-2).

Aliĝis do 35 gelernantoj (se vi adiciis la ĉi-suprajn ciferojn, vi ja scias tion!)

En la lasta "INFORMILO" ni jam anoncis, ke 2 ĉi-jaraj gelernantoj finlernis "Metodon 11": Sr^o DERUELLE (54360 BLAINVILLE) gvidita de Sr^o GREINER kaj Sr^o DEMAI (68093 Mulhouse) gvidita de Sr^o Grossmann. Nun Sr^o Deruelle ankaŭ finlernis "M12" kaj daŭre lernas. Finlernis nun "M11" 6 pliaj personoj: Sin^o Florence HELLA (kiun mi gvidis en Nancy), Sin^o Monique THIEBAUD (70290 Champagny) gvidita de Sin^o Busser, Fin^o Denise PERROCHAUD (54510 Art-sur-Meurthe) gvidita de Sr^o Greiner, Sin^o Evelyne DIDELOT (88000 Épinal) gvidita de Fin^o Roux, Sr^o Marcel CRANCE (52500 Fayl-Billot) kaj Sin^o Camille VANDERBISTE (51210 Vauchamps) gviditaj de Sr^o Degrelle.

El 6 finlenintoj de "M11", 4 ĝis nun aliĝis al M12. Kompreneble pluraj aliaj gelernantoj plulernas sian M11. Verdire aliaj ne plu donas vivsignon kaj kelkaj eĉ ne sendis taskon. Por kompletigi tiujn informojn mi ankaŭ diru, ke 14a lernanto (el 39) de la antaŭa jaro finlernis M11 (Sr^o Jean-Roger CHASLE, 22650 Ploubalay, gvidita de Sr^o Greiner Gratulojn al ĉiuj finlernintoj!

Lastjare nur 31 aliĝintoj al M11 (el 39) mendis la kasedon. Ĉi-jare ĉiuj aliĝintoj, sen unu sola escepto, mendis ĝin!

Jean-Paul COLNOT

LA "TRILANDA RENKONTIĜO" EN FREJBURGO

Jen alia renkontiĝo al kiu la grupo de Mulhouse estis invitita kaj kiu okazis la 14an de februaro 1987 en Frejburgo (Fribourg).

La urba E°-grupo proponis allogan kaj varian programon, kiu komenciĝis per komuna kafo kaj multaj diversaj kaj bongustaj kukoj.

Temis ankaŭ pri amasa renkontiĝo, ĉar partoprenis ĝin proksimume 40 homoj, inter ili kelkaj junuloj.

Ek de la dek-kvina horo komenciĝis alia parto de la programo, kiu konsistis el diversaj temoj: laborkunsido pri jubileaj aktivadoj (komuna ekspozicio) = konversacia rondo = novaj ludoj.

De la grupo de Mulhouse 4 personoj elektis la "konversacian rondon". Mi-mem estis inter ili, ĉar mi havis intereson aŭskulti la certe interesan debaton. Temis pri la problemo: "Kiaj rimedoj por la Paco en la Mondo"? Nur la diskuton mi ne partoprenis pro manko de lerteco kaj flueco en la parolado de la internacia lingvo. Cetere la Francoj ĝenerale estis relative neparolemaj dum la konversacio... sed tamen atentemaj, ĉar ili sekvis la tutan debaton kun granda intereso. La konversacio estis vivanta dum la tuta daŭro, des pli ke la partoprenantoj estis diversnaciaj: Germanoj, Svisoj, Italino, Francoj... kaj eĉ Dano. Tiamaniere, la diskuto ne estis teda, ĉar temis ne nur pri la problemoj en Germanio, sed ankaŭ pri tiuj en la 4 aliaj reprezentitaj landoj. Post mallonga paŭzo, kiu ebligis konatiĝi iomete unu kun la alia, la debato daŭris kun la sama vigleco kiel antaŭe, kaj tiel ĝis la dek-oka.

Estis ja la horo tre atendita de preskaŭ ĉiuj partoprenantoj laŭ la sama ĉeesto; tiam komenciĝis la lumbild-prelego pri la Universala Kongreso en PEKINO, prezentita de Sr° Rentschler, tre lerta kaj tre vigla esperantisto germana. Li havis la afablecon prezenti al ni detale kaj klare sian certe neforgeseblan vojaĝon de Ruslando ĝis Ĉinio, tra Mongolio per la fama "Trans-siberia Trajno", kaj ankaŭ sian restadon en Ĉinio. Dekoj da mirinde belaj bildoj pasis antaŭ niaj okuloj (!) kaj kiam oni enŝaltis la lumon, ĉiuj estis tiritaj el tiu unu-hora revado...

Estis ankaŭ la lasta grava punkto de tiu tre agrabla programo, ĉar poste oni atendis la partoprenantojn ĉe la apuda picejo. La tuta aranĝo okazis en la kutima kunvenejo de la loka grupo kiel ĉiulunde vespere. Ni ankaŭ finis en amika etoso tiun "vesperon" en apuda kaj agrabla picejo.

Dankon pro la invito al tiu agrabla tago kaj gratulojn al la tuta grupo pro la tre bona organizo de tiu simpatia renkontiĝo.

Laurence REIBEL

HAGONDANGE

Okaze de la alveno en HAGONDANGE, kie momente ne ekzistas E°-grupo, de la esperantistaj biciklantoj, estis informitaj la loka agentejo de "Républicain Lorrain", kiu ricevis abundan dokumentadon, la urbestro kaj la loĝantoj de Strato ZAMENHOF. La 18an de majo, depono -pli ĝuste dirite alkroĉiĝo- de bukedo ĉe la angulo de "Rue du Dr Zamenhof" malantaŭ la urbdomo, en ĉeesto de lokaj esperantistoj kaj de pluraj reprezentantoj de la urbestraro, kiuj poste invitis la partoprenantojn al honorvino. "Le Républicain Lorrain" ne nur fotis sed longe intervjuis la biciklantojn (post antaŭanonco) kaj raportis.

Jen la informslipo, kiu estis sisteme ŝovita en ĉiun leterkeston de la loĝantoj de la Strato Zamenhof:

Chers habitants de la Rue du Docteur Zamenhof,

Pourquoi y a-t-il aujourd' hui un bouquet de fleurs près du nom de votre rue?

C'est que l'invention du Dr Zamenhof, la langue internationale espéranto, fête cette année son centenaire.

A cette occasion quelques jeunesespérantistes ont décidé de faire le tour d'Europe à vélo. Partis du Sud de la France, ils se sont rendus en Espagne et en Suisse et ils sont aujourd' hui dans votre ville. Mieux faire connaître la plus facile des langues vivantes, l'espéranto... tel est leur but. Et leur périple qui doit les mener en Suède, en Pologne, en Turquie... est l'occasion de pratiquer la langue du Dr Zamenhof avec les jeunes espérantistes qu'ils rencontrent aux différentes étapes.

Si vous désirez de plus amples informations, vous pouvez contacter le Club d'Espéranto du Lycée Charlemagne, 17 Av. Clémenceau, 57100 THIONVILLE. Vous pouvez également renvoyer à la même adresse le document joint ("1er rendez-vous").

Nia 2a-grada kurso plu funkciis 2-foje monate ĝis la 10a de junio. Same pri nia kunveno, kun kurso prepare al "Kapableco", kiu okazis unufoje monate ĝis la 17a de junio.

Ni jam planis nian agadon por la aŭtuno kaj la centjariĝo de Esperanto: ni prezentos la belan ekspozicion amezprizorgitan de P. Denis en Socia Centro "Henri Bazin" de la 14a ĝis 21a de septembro, en la Granda Halo de la Urbodomo de NANCY de la 21a ĝis la 28a de septembro kaj fine en la Junuldomo Philippe Desforges de la 28a de septembro ĝis la 5a de oktobro. La vesperaj kursoj rekomenciĝos nur la merkredon 14an de oktobro (post reveno de la universitataj studentoj) je la 20a30; alia kurso povos funkcii je la 18a horo, se interesatoj enskribiĝos! Ni planas eldoni 3000 flugfoliojn por akompani nian kampanjon.

La 14an de aprilo, 70a datreveno de la morto de Dr° Zamenhof, la regiona radio-stacio "RADIO-FRANCE-NANCY" dediĉis ludon -kiu okazas ĉiutage de la 11a30 ĝis la 12a30- al la temo ESPERANTO. La celo de la ludo, animita de la ĵurnalistino Marianne Bernède, estis trovi, danke al telefona helpo de radio-aŭskultantoj (kiuj povis ricevi pro la efiko de sia helpo diversajn premiojn) kelkajn esperantistojn kaj intervjui ilin pri Esperanto, la vivo de Zamenhof, la agado por E°, ktp. Por konservi al la ludo la freŝecon de natenditeco neniu esperantisto estis kompreneble informita. Aŭskultantoj de Nancy direktis la ĵurnalistinon al la Junuldomo Ph. Desforges, kaj el tie oni vane provis trafi min telefone ĝis la 12a15... Tiam mi revenis hejmen el mia laborejo kaj konsentis respondi tuj al intervjuo, kiu devis nepre finiĝi je la 12a30 por la fino de la elsendo! Nur poste mi eksciis, ke la elsendo fakte daŭris unu horon, kun inter aliaj, longa intervjuo de la kuratoro de la Esperanto-Muzeo en GRAY, Geo JURNIER.

Mi petis, ĉu eblas ricevi kasedon kun kopio de la elsendo sed oni respondis... "Ne eblas, ni ne kopiis la elsendon. Tio estis ebla, kondiĉe, ke vi petu tion antaŭe!"...

Marianne Bernède promesis dediĉi alian elsendon al Esperanto okaze de la ekspozicioj planitaj por aŭtuno.

Jean-Paul COLNOT

GERARDMER

Esperanto ĉiam vivas en Gerardmer!

La 6 geamikoj, kiuj helpis la LKK-anojn por prepari la Nacian Kongreson serioze partoprenas kurson per "Metodo 12". La kurso komenciĝis en oktobro kaj estas gvidata de Robert COLIN. Ĝi okazas en la kulturdomo merkrede, de 14h30 ĝis 16h30. Je la fino de ĉiu kunsido oni legas kelkajn paĝojn el esperanta romano.

La kurso estas fako de la "Maison de la Culture et des Loisirs" kaj oni mencias ĝin en gazetoj, afiŝoj kaj raporto de la ĝenerala kunveno.

krome, ankaŭ Michèle LAMBERT hejme instruas la-gradan kurson per "Metodo 11" por 4 komencantaj plenaĝuloj.

13 libroj kaj diversaj revuoj estas la kerno de kreskiĝonta esperanta biblioteko.

MALFERMITA LETERO AL MIAJ FRANCAJ GEAMIKOJ...

De tempo al tempo, dank' al la afableco de francaj gesamideanoj, mi ricevas la bulleton "La Informilo" kaj tiel mi ekscias novaĵojn pri la Esperanto-movado en via regiono kaj pri la laboro de la Kultura Esperanto-Federacio en Orienta Francio.

La pasintan aŭtunon mi vojaĝis al Hispanio kaj mi havis la feliĉan eblecon partopreni tre interesan aranĝon, organizita de esperantistoj en urbo Avignon. Nun mi volus pere de la paĝoj de via bulletono esprimi miajn impresojn kaj opinion pri tiu aranĝo. Ebligis kaj realigis mian partoprenon la ĉefa organizanto S-ro André Gente, sekve de la rekomendo de S-ro Roger Colney.

Mi estis invitita ĉeesti la 3an Rodanan Esperanto-rendevuon, organizita de "Societo Yvonne Martinot" /franca filio de "Literatura Foiro-Kooperativo" / kaj de Vaŭkluzia E°-Grupo. Tiel mi per unua fojo sekvis la laboron de renkontiĝoj, jam sufiĉe bone konataj en Esperantujo. Ĉeestis Francoj, itala grupo el la urbo Chiavari kaj kelkaj alilandanoj. Ni ĉiuj estis akceptitaj afable. La gastigantoj certigis por ni bonegajn restadon diĉojn. Dispartigitaj en kelkaj laborgrupoj, laŭ la lingva kapableco, ni utiligis la horojn sabate posttagmeze kaj dimanĉe antaŭtagmeze. Dum la ripozpaŭzoj ni povis interkonatiĝi, babilu, ŝanĝi opiniojn kaj rigardi la riĉan libroservon. Mi-mem partoprenis la laboron de la grupo, en kiu S-ro Giorgio Siefer per sia prelego prezentis la evoluon de la Esperanto-literaturo. Tagmeze kaj vespere ni povis daŭrigi la konversaciojn kaj la babiladon ĉe abundaj manĝotabloj, en agraba bonhumora etoso. Vere, neforgeseblaj restos tiuj kelkaj vesperoj!... Ni kantis, ĵercis. La unuan vesperon S-anino Simonne Ulm prelegis per diapozitivoj pri "Mikelangelo kiel skulptisto". La alian, S-ro Formaggio /itala samideano/ ĝojigis nin per diapozitivoj pri Italio.

Ne mankis en la programo arta prezento. Tiel, ni ĝuis la spektaklon de la profesia aktoro André Morel, tute nova esperantisto, kiu majstre prezentis la verkon "Kandid" de Voltaire, tradukita en Esperanto de Lanti. Mi miris la kapablecon kaj la

talenton de tiu aktoro, kiu mem reĝisoris, parke-re lernis la enhavon kaj lerte, en daŭro de pli ol 2 horoj, ludis la teatraĵon en pura Esperanto kun perfekta prononco, ĉe la akompano de bela muziko!...

Fine, kiel krono al ĉio, la francaj geamikoj surprizigis nin, la alilandanojn, per belaj ekskursoj al najbaraj urboj kaj lokoj. Tiel ni povis konatiĝi kun granda parto de la Sud-Franca regiono. Entuziasme la senlaca s-anino Simonne gvidis nin tra la stratoj de Avignon, rakontis pri la urba historio, pri ĝiaj monumentoj kaj ri markindaĵoj. La vizito en la urbo Arles restos memorinda pro la vizito de la katedralo. Survoje ni vidis multajn interesajn restaĵojn de la pasinteco. Vizitante urbon Nîmes ni restis ĉe urbaj gesamideanoj, kiuj havis kunvenon kaj kurson.

Kompreneble mi ne kapablos priskribi ĉion, kion mi travivis kaj kio impresis min dum tiuj tagoj. Tamen restas firme en mia animo la bonkoreco la afableco de la homoj, kiuj akceptis kaj gastigis nin. Mi volus substreki mian admiron de la energio kaj de la forto de la Esperanto-ŝajro en la horoj de familio GENTÉ!

Per mia "malfermita letero" mi esprimas mian tuthoran dankon pri la bela aranĝo organizita tiel sindone de la esperantistoj en urbo Avignon.

SOFIA, 1987
Bulgario

Lilija Pavlova Koleva
Bulev. Cvetko Radojnov n° 10-2°
SOFIA 1527 BULGARIA





MONDHEJMO

EKOLOGIA CENTRO INTERNACIA
kun Esperanto kiel oficiala lingvo

*Mi ne volas florojn sur mia tombo
aŭ en iu ajn imaga paradizo,
sed dum mia vivo
kaj sur nia planedo.*

Justo

Same kiel Justo, ni ne volas atendi ĝis nia morto por havi florojn, nek deziras vivi ĉiam en nehumanaj kondiĉoj. Tial ni serĉas gesamideanojn, kiuj kune kun ni volas konstrui aŭ subteni ekologian hejmon internacian.

Por atingi tiun celon ni fondis asocion, kies statuto aperas ĉi tie.

La bazaj principoj de nia projekto estas jenaj:

- Ekologio staras antaŭ financa profito; t.e. naturo estas pli grava ol mono.
- En MH (=Mondhejmo) regas frateco, amo kaj racio. Ni ne volas esti ŝajne feliĉaj je la kosto de aliaj, sed vere feliĉaj kune kun niaj gesamideanoj. Ni estu pacemaj, amemaj kaj amindaj.
- Ni penos eviti la maljustojn, kiujn kutime suferas virinoj, kaj ni aspiras disdoni la taskojn kaj decidrajtojn ĉiam egale inter viroj kaj virinoj.
- Interne de nia tereno ni ne funkciigos poluciantajn kaj bruajn motorojn. Esceptoj, nur kiam ili ne estos eviteblaj.
- Ni klopodos utiligi senpoluciajn energifontojn kiel sun- kaj ventenergien.
- Fumi en MH ni rigardas kiel mankon de konsidero al la kunloĝantoj, kontribuojn al aermalpurigado kaj damaĝan ekzemplon por la infanoj.
- Konsciente, ke nuntempe ne ekzistas pli taŭga lingvo ol Esperanto por ludi la rolon de mondlingvo, ni konsideras Esperanton kiel nian oficialan lingvon, instruos ĝin regule kaj subtenos ties disvastigon interalie per kulturaj aranĝoj, ankaŭ por infanoj.

Por subteni finance MH-n povas ekzisti du enspezofontoj: luigado de ĉambroj kaj parceloj, kaj kontribuo de mecenatoj, verduloj kaj pensiuloj, kiuj volas logi ĉe ni por longa tempo aŭ por ĉiam.

La kapitalo de la asocio konsistas el la aliĝkotiĝoj kaj seninterrezaj pruntedonoj. La unua kotizpago validas kiel aliĝdeklaro. Minimuma aliĝkotiĝo kiel plena membro: 300 ff. Ĝis de niaj administraj ebloj, ni akceptas ankaŭ alispecajn kotizkontribuojn (laboron en MH, librojn k.s.) ekvivalentajn al la mona kotizpago. Ĉiu membro ricevos kvitancon pri sia pago, kaj minimume 1 fojon jare raporton pri la evoluo kaj financa situacio de nia asocio.


Ni ĵus finaranĝis la aĉeton de 3 dometoj en ruina stato kaj 3.000 m² da tereno - parte konstruebla - en la preskaŭ forlasita vilaĝo Cauduro (koduró), 40 km okcidente de Béziers (Sudfrancio), inter la urbetoj Saint-Pons kaj Saint-Chinian.

La jara kotizo estas 30 ff, pagebla en por vi pli konvena maniero: okaze de vizito al MH, per ĝiro aŭ alimaniere. La unuan jaron ĝi estas entenata en la aliĝkotiĝo. Per la jaraj kotizoj la estraro intencas kovri la kurantajn elspezojn por informado, propagando, administrado. Por depreni monon el nia asocia ŝparkonto necesas komuna subskribo de du estraranoj.

Por simpatiantoj, kiuj pro financaj aŭ aliaj kialoj ankoraŭ ne volas esti plenaj membroj, estas la eblo aliĝi kiel membro apoganta pagante nur 60 ff inkluzive de la unua jara kotizo. Membroj apogantaj rajtas uzi MH same kiel plenaj membroj, sed ili ne havas decidpovon pri asociaj aferoj, kiel ekzemple la elekto de la estraro. Pagante la diferencan inter 60 ff kaj la plena aliĝkotiĝo, membroj apogantaj povas ĉiutage iĝi plenaj membroj.

Por prunteprenita mono nia asocio ne povas pagi interezojn; tamen, por kompensi ilin, la pruntedonant/in/oj de mono al Mondhejmo rajtas uzi ties instalaĵojn sen kontribui per taga kotizo, ĉiujare dum tiom da tagoj, kiom estas ekvivalento al la ne-ricevitaj jaraj interezoj ĉe franca banko. Ekzemplo: se la taga kotizo estus 20 ff, kaj pruntedonant/in/o ricevus de franca banko 600 ff jare, li/ŝi rajtus loĝi senpage ĉe MH dum 30 tagoj ĉiujare. Ĉiun trian jaron post la pruntedonado, la estraro esploros la eblon redoni la prunteprenitan monon kaj sendos raporton ĉi-rilate al la pruntedonint/in/oj.

Estraro kaj adresoj:
prezidantino: Nicole PAIROUX / Rue Saint-Luc 35 / B-5004 Namur
sekretario : Akiles SANZ / Hafenplatz 6, Ap.206 / D-1000 Berlin 61
kasistino : Catherine SAMAIN / 9 av. de Verdun/F-60200 Compiègne.
Poŝtkonto: PARIS 21 747 70 L / MONDHEJMO - CTRE ECO INTER
9 av. de Verdun / F-60200 Compiègne.



- 1 D 179 → Pardailhan (P)
2 D 179E → Cauduro (C)
Béziers → N112

STATUTO

- 1- La subskribintoj fondis asocion laŭ la franca leĝo de 1-7-1901.
- 2- Ĝi havas la nomon "Mondhejmo - Ekologia Centro Internacia".
- 3- Celoj: 1) Starigi hejmon en Francio por ekologiaj konsiantaj homoj el ĉiuj landoj.
2) Uzi Esperanton kiel oficialan lingvon de la asocio por la kono, ke nuntempe ne ekzistas pli taŭga lingvo por la internaciaj rilatoj.
3) Organizi kulturajn aranĝojn kaj pri Esperanto kaj pri la ekologia scienco, same kiel pri ties aplikoj favore al la internacia kompreniĝo.
- 4- Ĝia provizora sidejo estas ĉe Catherine SAMAIN / 9 avenue de Verdun / F-60200 Compiègne
- 5- Povas esti membro ĉiu persono, ankaŭ ne-esperantistoj, kiu akceptas ĉi tiun statuton kaj pagas la kotizon.
- 6- La servoj de la asocio estas rezervataj al ties membroj.
- 7- La asocio estas administrata de estraro konsistanta el prezident(in)o, sekretari(in)o kaj kasist(in)o. Ĝis la unua elekto, la estraro konsistas el la subskribintaj membroj. Ĉiujare dum la unua trimestro, oni elektos novan estraron per letera sekreta voĉdonado.
- 8- La enspezoj de la asocio konsistas - krom eblaj donacoj kaj subvencioj - el la aliĝkotiĝoj kaj la jaraj kotizoj.
- 9- Interna regularo fiksas la kvanton de la jaraj kotizoj kaj la aliĝkotiĝo.
- 10- Por modifi la statuton aŭ por likvidi la asocion necesas la plimulto de du trionoj, konstatita per letera sekreta referendumo. En okazo de likvido, ĝiaj posedaĵoj estas atribuataj al simila asocio, aŭ - ĉe manko de tiu ĉi - dividita; duone inter unu ekologia kaj unu Esperanta asocio, kiu, estas determinataj de la membroj per simpla plimulto en letera sekreta baloto.

Compiègne, la 28-a de marto 1986.

Prezidantino: Catherine SAMAIN
Sekretario kaj Kasisto: Akiles SANZ

Esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj



moi! j'aime parler¹⁵
esperanto...
alors, je participe!..

ankaŭ notenda:

Staĝoj de la "KVINPETALO", Route de Civaux, F-86410 BOURESSE:

Julio 10/15a Formado de recenzantoj. Recenzo-arto per studo de literaturaj verkoj.
Gvidos: Ed. BORSBOOM

23/28a Jurnalisma grafiko.
Gvidos: Perla MARTINELLI

30a de julio/4a de aŭg° Historio de la E°-komunumo; preparado al la parto de PEDAGOGIA ATESTO kaj ALTAJ STUDOJ.
Gvidos: Giorgio SILFER

Aŭgusto 6a/11a Formado de radiofoniaj aktoroj.
Gvidos: Giorgio SILFER

11a/16a de septembro Stud-, ripoz-, kaj turism-staĝo.

(petu tuj aliĝilojn ĉe Suzanne BOUROT, rue Morel-Payen F-10000 TROYES)

10|17ajn de aŭgusto Granda Internacia Junulara Renkontiĝo en CREON (25 km de BORDEAUX)
Inf.: Gilles LAFITTE, Clairière des Aubiers, entrée 7, app.235 F-33300 BORDEAUX

7a^a kaj 8a^a de novembro 1987: 25A STAĜO DE PAROLATA ESPERANTO
MONTIGNY-lès-METZ



4-gradaj kursoj! = Elstaraj debat-prelegoj kun partopreno de A. CHERPILLOD, lingvitikisto!

ALIĜILO en nia venonta n° (59)

4/6ajn de decembro 30a KULTUR-SEMAJN-FINO de SEL
Prelegos Dr° LAPENNA!
Inf.: SEL, Schulstraße 30,
D-6601 SAARBRÜCKEN-SCHEIDT

KAJ DUM LA TUTA JARO...

ELSTARAJ STAĜOJ KAJ KULTUR-FERI-SEMAJNOJ

EN... KULTURA CENTRO ESPERANTISTA
DE LA CHAUX-DE-FONDS (SVISLANDO)

Petu tre detalan programon 1987 al

K.C.E., PF 771, Postiers 27, CH-2301 LA CHAUX-de-FONDS.

"Tiu, kiu nur unu fojon vizitis K.C.E. ne povos ne reveni!..."

- Li, ŝi, mi... ni ĉiuj!-



? U distra anĝelo



	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

1 El kio oni forprenis grasajon. 2 edikto (r) - venena substanco (r) - metalo (r) - ne akompanata (r)
 3 Parto de ŝipo - aloj (r) - interjekcio. 4 Por meti fojn (r) ekz. (r) - ujo - sufikso - pronomo.
 5 Ebena limiganta volumenaĵon (r) - kardinala punkto (r) - ne preni. 6 Posesiva - sammezura - simio (r). 7 Por silentigi - proprio de l' homo - konsumi - preni aŭ doni (r). 8 unuo de laboro - specio de prunuso (r) - granda ŝtono (r). 9 Eble juvelo (r) - manĝebla aŭ venena (r) - sufikso.
 10 Por enigi en specialan truon (r) - seĝo. 11 Sekvu la rektan! - neeviteble - senvosta vertebrulo

(r). 12 Movigi - gemo - superhoma estaĵo (r).

VERTIKALE 1 El puto ekz. (r) - pronomo. 2 Prepozicio - brila strio (r) - kolerigi (r) - abonnumero 79. 3 Pilotfiŝo (r) - granito (r). 4 Mara herbo - nano (r). 5 Palmo (r) - pronomo - tio taŭgas. 6 Nedefinita tempo - instigi (r) - malgranda parto (r). 7 Li parolas per gestoj - por borderi - aerfeo - interjekcio. 8 Pronomo - damaĝe rando refaldita (r). 9 Malgranda hajlo (r) - nitrogeno (r) - ĝeni. 10 Kiu rilatas al grava nervo (r) - monero. 11 Pura sono - Diino de la luno (r) - maldika metalaĵo (r). 12 Sugesti - malgranda ŝipo - post li.

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

aro at be ei en eo er fri gio in in ino io kl ko ko ksi la la le mi na ne nio no nu ob om
 op op po ra re si sme so ta ti to uz ves

- | | | |
|----|---------------|-------------------|
| 1 | + - - + - | laborejo |
| 2 | + - - + - - | religiulo |
| 3 | + - - + - - - | komponisto |
| 4 | + - - + | sin submeti |
| 5 | + - - + - - - | malsano |
| 6 | + - - + - - | giganto |
| 7 | + - - + - - - | vortaro |
| 8 | + - - + - - | okuldifekto |
| 9 | + - - + - - - | bonzorgi monon |
| 10 | + - - + - - - | ne mankas al vi! |
| 11 | + - - + - - - | nord-lando |
| 12 | + - - + - | marbesto |
| 13 | + - - + - - | tirane premege |
| 14 | + - - + - - | ĉelocentro |
| 15 | + - - + | por plumskribanto |



"I MUST WARN YOU! - I DO ESPERANTOI!"
 (PUNCH - APRIL 1 - 87)

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (n°57)

Krucvort-enigmo: ekvinokso ŝer ventoli amelo oper ĉant erin ruinig enig istmo rano fid
 mirind koraci otari rimen uf ĝeni gagat agi ilin trui sol reag ur oranĝo
 aneto etil oaz fulg at okaza

"Silab"-enigmo: "Kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas!"